


KTP!



La revuo de la
Usona Esperantista Junularo
VOL. II, N-roj 10-11



624 Second St.
Lancaster, PA 17603-5114
ISSN # 1078-6554



Founded in 1993, it is the official newsletter of the US Young Esperantists. It is published 6 times a year and sent out to all members and supporters of USEJ.

Contributions may be sent to the address above. Opinions expressed in articles are those of the authors and not of USEJ or the Editor.



Fondita en 1993, ĝi estas la oficiala novaĵletero de la Usona Societo por Esperantista Junularo. Ĝi eldoniĝas 6 foje jare kaj estas dissendata al ĉiuj membroj kaj subtenantoj de USEJ.

Kontribuaĵoj estu sendataj al la adreso supre. Opinioj esprimitaj en artikoloj estas tiuj de la aŭtoro kaj nek de la Redaktoro, nek de USEJ.



Redaktoro/Editor: Jozef Truong
Artaĵo/Art: Matthew Horton
Kompostisto/
Layout: Sybil Harlow
Limdato de n-ro 12: la 15 de aŭgusto
Deadline for issue 12: August 15

Karaj Amikoj,

Ĉi tiun numeron ELNA malavare eldonis grandkvante por disdonado dum la 43a Nacia Kongreso (New York City), la 80a Universala Kongreso (Tampere) kaj la 51a Internacia Junulara Kongreso (Sankta Peterburgo). Al ELNA, kaj aparte al la oficistoj de la CO de ELNA, miajn korojn dankojn pro via helpo!

Al niaj novaj legantoj, bonvenon al la mirinda kaj esperplena usona junulara movado! Hazarde, ĉi tiun numero enhavas ne nur la sinprezentadojn de niaj novaj estraranoj, sed ankaŭ la jarraporton pri la agado de USEJ de aŭgusto 1994-1995. Do, en via mano, vi havas ĉiujn utilajn informojn pri USEJ!

Dum vi legas KTP!-n, memoru, ke USEJ fondiĝis nur antaŭ tri jaroj. Tiel vi vere rimarkos la progreson kiun ni faris ekde tiam, kaj samtempe la grandega kvanton da laboro kiu ankoraŭ restas por ni, junuloj usonaj. Pro tio, viajn ideojn, informojn, kontribuojn ktp., ni varme kaj dankplene akceptas!

Al niaj malnovaj legantoj, malfeliĉe ne eblis eldoni alian numeron antaŭ ol okazis la Nacia Kongreso. . . desegnado de T-ĉemizoj, vizito al teatraĵo en la fama strato "Broadway", muzikaj koncertoj, piknikoj. . .

Jes ja vi maltrafis aparte ĉeestindan renkontiĝon! Do, kiam alvenos la aliĝiloj por la 44a Kongreso- Detroit '96, rapide aliĝu por ke vi ne perdu okazon ĉeesti tiun raran eventon! Cetere, inter nun kaj la venonta jaro, ni ĉe USEJ daŭre kolektas novajn proponojn por la junulara programo. Se vi havas treege bonan ideon, sendube forsendu ĝin al ni.


Al ĉiuj legantoj, novaj kaj malnovaj, bonan kongresumadon kaj komfortan (kaj espereble ne tro varmegan!) someron!

Jozef Truong

What's inside...

Gratulojn!	
Vian novan estraron	3
FEL artikolo	6
BENNEM	6
Setting the Scene	7
Estrarar-adresaro	7
Aventuroj en la Amiŝlando .	8
Bringing Hope	
in a Hopeless World	9
Esperanto Venos Savi Vin! .	9
Jarraporto de USEJ	10
Lingva Angulo	12
@esperanto	13
Cerbumadu!	14
Ĝuste kiel James Bond	15

© 1995 Usona Esperantista Junularo



KTP! ★ The International Esperanto Museum in Vienna has 21,000 bound books and 12,308 photos. ★

GRATULOSNI!

Jen la uloj (kaj ulinoj, bonŝance!) kiuj laboros dum la venontaj du jaroj per kaj por vi, nome de USEJ. Ĉar nur ses membroj kandidatigis por la ses lokoj en la Estraro de USEJ, ni ne bezonas okazigi elektojn ĉar ĉiuj el ili aŭtomate fariĝas Estraranoj.

*Por kandidatigi, ni petis, ke ĉiu membro skribu respondon al la jena demando: **Imagu, ke estas la jaro 1997 kaj vi ĵus finis vian laboron de USEJ dum la pasintaj du jaroj". (Jes, sufiĉe pensiga demando).***

Ni prezentas nun ne nur la mallongigitajn respondojn, sed ankaŭ iliajn ridetojn kaj ion pri iliaj privataj vivoj. . . la plej preferataj glaciaĵoj, feriaj lokoj, gazetoj, bildstrioj. . . la gravaj aferoj de la vivo.

Ĉion ni prezentas por ke vi memoru, ke ili ankoraŭ estas membroj kaj junuloj kiel vi! Do, ne hezitu kelkfoje skribi al ili pri viaj ideoj kaj respondoj, ĉar ili ja reprezentas VIN. Kaj, cetere, petu nun iliajn subskibojn por ke vi havu memorojn de ili post kiam ili fariĝos gravuloj en TEJO, UEA, UNO. . .

Daniel Cuthbert



*Glaciaĵo: Peanut Butter Chocolate
Feriaj Lokoj: Sanibel Island, off the
Florida Coast*

*Gazeto: The New York Times
Magazine*

Bildstrio: Scrooge McDuck

The past two years have been good to USEJ. It has seen a steady continuance of membership growth as a result of increased exposure to the American youth

This is partially due to increased cooperation between the existing campus and high school organizations. Taking ideas from the Japanese inter-campus network, *Rondo Harmonia*, USEJ was able to organize a standardized base for college and high school groups to work from. This has led to an increase in attendance at the regional congresses. The branch groups keep in touch over the Internet with one another and the central office.

The Internet, too, has led to increased exposure for USEJ. The establishment of an USEJ World Wide Web Home page has led to a significant increase in inquiries about the language. USEJ uses the Net to remain in contact with the other world youth groups and local branches.

Another accomplishment is the exposure gained from partnerships with strong, international and service organization such as AFS, Circle K, and HABITAT. While USEJ participation in events held by these groups bolstered USEJ membership interaction, it simultaneously advertised Esperanto.

Sybil Harlow

Glaciaĵo: Butero-krizeto

*Feriaj Lokoj: La Kaskadoj, Oregono -
Havas grandioza vidaĵo de
akvoŝalo kaj imponaj monroj.*

Gazeto: US News & World Report

*Bildstrio: Robotman, BENNEM,
Dilbert*

Innovative and bold, those two words are being used to describe the USEJ. Ever since it was announced that we would host the IJK, people have noticed what has been accomplished in such a few years. Has it been 6 already?!? I guess that while the 1997 IJK in the San Francisco Bay area was a highlight, everything else that we have done has been having a significant effect on our movement.

Many of our activities advertised Esperanto via the internet and other media. The USEJ mailing list and the World Wide Web page (plug: <http://ftp.webcom.com/~usej>) enabled us to aggressively promote Esperanto among our target age group. The new USEJ flyers and brochures introduced us to outside groups. Both the mini-conferences at the ELNA congresses and Esperanto-USA column helped foster cooperation between ELNA and USEJ members.

We also achieved a revitalization of youth spirit here the US. Our conferences: NAJT, JES, ARE, etc., have been a boon, generating a unified movement and group spirit. Whether it was skiing in Vermont, singing at the campfire by the lake, tie-dying T-shirts, or listening to music in the park, there was definitely fun to be had.

The successes of our board have paved the way for a stronger youth movement.

Matthew Horton



Matt kaj
lia edzino,
Josefina

Glaciaĵo: Nigra Ĉeriza

*Feriaj Lokoj: Londono (mia
naskiĝloko)*

Gazeto: Omni

Bildstrio: Calvin & Hobbes

Through the use of new promotional materials and strengthened support for local clubs, USEJ membership has doubled since 1995. The donation of books provided by our members to public libraries has made Esperanto readily available to everyone. The accessibility of Esperanto has contributed to the increase in membership and also helped to show that Esperanto is not dead, but thriving.

Our Talent Pool Program is now in full operation. USEJ members were asked to register any special skills, talents, tools, or materials they possessed with USEJ. The board then used the registry to group together members whose combined resources could aid in the growth of USEJ and the promotion of Esperanto.

The linking of local clubs has created a web of information and support. Every local club exchanges newsletters and ideas on a regular basis with two or three other local clubs. Clubs have worked together to develop ways to keep their current members interested and acquire new members.

We have just completed a report on all the projects carried out by USEJ in the past two years. This report will be sent to Esperanto organizations around the world.

Theresa Makin



*Glaciaĵo: "Ŝtonplena Vojo" (Rocky
Road)*

*Feriaj Lokoj: Toronto (La Glithokea
Halo de Famo kaj vendejo de
pasteĉoj de Tim Horton troveblas
tie... sufiĉe dirite!)*

Gazeto: National Geographic

Bildstrio: Calvin & Hobbes

I am very proud to announce the certification of two new teachers of Esperanto. Both active members in their local clubs, these teens join about a dozen other teenage Esperanto instructors certified during the past two years. They look forward to teaching their peers the language of Esperanto and the concept of peace and harmony which all Esperantists hope to achieve. I am also proud to announce the formation of fifteen new clubs during the past two years.

I would also like to use this opportunity to advertise "Paco," the recording made by Esperanto youth groups in six nations, including the US. Interested parties can purchase cassettes and CDs from the Libro Servo. Any ideas for the upcoming "Paco II" are also welcome.

Finally, I would like to announce the recognition of USEJ as a permanent member of the United Nations Youth Advisory Council.

Elections for delegates will take place in August of 1998.

Thank you for your support during my term, and please continue to support USEJ in our quest for a peaceful and harmonious future.

Jed Meltzer



Glaciaĵo: Azteka Rikolta Kafo (de Ben and Jerry)

Feriaj Lokoj: Pittsburgh (Sendube. Mi estas en tre longa, multekosta ferio ĉi tie kaj nur havas kelkajn universitatajn kursojn por amuzo.)

Gazeto: Reader's Digest

Bildstrio: Bloom County kaj Far Side, sed ili malaperis!

I'm glad that our movement has grown and strengthened.

We were able to survive the influx of Michael Jackson fans into USEJ following his three-minute commercial in 1995. A main concern should be to portray Esperanto as a serious, useful tool for communication, rather than an intellectual curiosity for eccentrics. The last thing we needed was a bunch of Michael Jackson freaks! (I'm just kidding; eccentrics have always been the main force behind change)

But seriously, I am really pleased with the unity that has evolved in USEJ. The establishment of an USEJ e-mailing list and a world-wide-web page has greatly facilitated internal communication and the annual meetings have helped us keep our focus: to promote the use of Esperanto in solving society's

problems, not just Esperanto for its own sake. Therefore, I am glad to see that some USEJ members have established contacts overseas to discuss work on human right, environmentalism, etc. Language allows us to work together; the more people we can communicate with, and the more efficient that communication is, the better our work will be.

So let's get out there and put our awesome language to use!

Guy Menahem



Glaciaĵo: "Biskvit-kaj-kremo" (Cookies and Cream)

Feriaj Lokoj: Israelo (mi naĝis en la plej puraj plaĝoj ie kaj renkontiĝis kun miloj de junuloj de la tuta mondo)

Gazeto: National Geographic

Bildstrio: Bugs Bunny

As my two-year term on the Board of USEJ comes to an end, I reminisce on all that we have achieved together. As we began our terms, we devised a Four Point Plan:

- Schools
- Local clubs
- Membership
- Kongreso

The first and most important aspect of our agenda was returning to a more grass roots efforts - going into the schools, and encouraging fellow young people to embrace what Esperanto has to offer.

Then came local clubs. A committee was formed to help young

people establish and continue organizations in their schools and localities.

Through our efforts, USEJ membership dramatically increased, especially in some "untouched" parts of the U.S..

And finally, USEJ, through its growth and influence, was able to hold its own Kongreso!

The youth of America, united, to propagate the International Language. And what a success it was!

I am honored that my samideanoj gave me the opportunity to serve and represent them. We, together, as a team, were able to increase the knowledge and usage of Esperanto in our country, and bring USEJ to the world!

Nathan Treadway



Glaciaĵo: "Biskvit-kaj-kremo" (Cookies and Cream)

Feriaj Lokoj: Coast of Maine...I go with my friends to a cabin there, that is right off the beach and at the same time nestled in the woods.

Gazeto: Natural History kaj Linux Journal (komputila gazeto)

Bildstrio: Far Side

"Nathan estis la sola bonŝanca estrarano kiu ne bezonis verki eseon, ĉar li ne timas perdi sian lokon en la Estraro! Kiel vi jam scias, li estas la fidinda kaj multe laboranta Kasisto de USEJ. Ĉar li ĵus fariĝis la Kasisto pasintjare, kaj ankoraŭ restas sufiĉe da financaj aferoj pri-taktotaj, la Estraro konsentis, ke li restas Kasisto du pliajn jarojn.

Continued from page 5

Inter liaj bazaj celoj por la venonta jaro estas simple certigi, ke USEJ havas almenaŭ dolarojn en sia kaso. Kompreneble, oni povas fari malmulte kun malmulte da mono. Cetere, li esploras aliajn manierojn por USEJ pli saĝe uzi sian monon kaj ŝpari monon, ekz. per akiri iun senimpostan statuson por USEJ.

Krom esti kasisto, li ankaŭ helpas en aliaj kampoj de la agado de USEJ, pri komputiloj (ĉar li ja laboras profesie per komputiloj), kongresaj kaj renkontiĝaj ideoj, ktp."

(verkita de Joseph Truong)



Joseph

"Unuvorte: Sukeeso..."


The Florida Esperanto League recently hosted its first Congress. It itself was a first- the first Esperanto congress to happen in the Deep South after quite a while. Aside from the traditional Congress activities, there was also a special trip to Saint Petersburg. . . .

Vere speciala kaj neforgesebla evento okazis en Belleairr (apud Clearwater), Florido de la 7a ĝis la 9a de aprilo, la Aprilo Kongreso de la Florida Esperanto-Ligo.

Ĉi tiu Kongreso estis la unua renkontiĝo de FEL. Por kelkaj, FEL prezentis la unuan fojon komuniki per la Internacia Lingvo. La temo estis "Kune, ni povas fari ĉion" kreskado de la movado en nia ŝtato.

La programo estis plenplena, kun kantoj (aparte "La Espero"), babiladoj, manĝoj, poemoj, kaj ludoj. Plej speciala estis la vizito al la muzea espozicio "Trezaroj de la Caroj" en Sankta Petersburgo (Florido, kompreneble!-ndlr). Ankaŭ interesaj estis la kunsido de la Kligona lingvo de Lee Lewis, kaj la diversaj klasoj pri Esperanto-literaturo kaj lingvo por ĉiuj niveloj.




Nia unua Kongreso estis unuvorte sukceso. Ĉiuj el la 16 partoprenantoj revenis al siaj propraj hejmoj kun pli granda scio kaj amo de Esperanto. Kaj, kune, la Florida Esperanto-Ligo sekvas la revon de Zamenhof kaj nia lingvo.



Guy Menahem
Clearwater FL



(c) 1995 Matthew Horton





SETTING THE SCENE

Estis vigla kaj sunbrila posttagmezo, la tago post mi ĉeestis semajnfina ludado-kongreson, kaj mi paroladis kun amiko kiu iam regis Esperantan rolludadojn. Mi ĵus partoprenis en du vivadaj rol-ludoj, unu kiel antikva, psikopata vampiro, la alia kiel juna, societa fraŭlino ĉe 1890a balo. Tiam mi komprenis ke Esperantistoj ĝuus partopreni similan eventon.

Basically live action role-playing is a form of participatory theater, where the audience act as characters in the story. It's a very relaxed, social gathering. And you don't have to worry about flubbing your lines, because you make them up as you go along.

Some of the basic points about running the live-action event are:

Write up broad characterizations, so that each person can make the character their own.

Create open-ended storylines, so the players have choices about their actions.

Plan other activities, games, distraction, at the

event to keep the action moving.

Delegate responsibility. Between making all the food for the party and taking care of all the character write-ups, I just ran out of time. Which meant I was tired, frazzled, and stressed out, when the party rolled around. (Funny no one seemed to notice :))

Set a firm sign-up date. In a storyline with interwoven characters, having five or six people as possible means writing characters up at the last minute or having extra characters who have little impact (AKA pointless, irrelevant and probably boring to play.)

If someone is supposed to die have it take place offstage, before the story begins if possible. I set up storylines that gave almost everyone a motive for murder, but no one would take the step, without some direct coercion on my part. Esperantists are just too nice.

For all the stress of the event it was a lot of fun. I'm even planning a new one: A Policeman's Ball in the Stainless Steel Rat setting. ☆

Estraranoj de USEJ 1995-1997

Daniel Cuthbert
44 Taliar Ridge Rd.
Guilford, CT 06437
daniel@jhu.edu

Sybil Harlow
3600 Data Dr., #591
Rancho Cordova, CA 95670
sybilh@calweb.com

Matthew D. Horton
PO Box 172
ElCentro, CA 92244-1472

Theresa V. Makin
2170 Fifteenth St.
Bethlehem PA 18017

Jed Metzler
1440 Circle Dr.
Telford, PA 18969
jamst80@vms.cis.pitt.edu

Guy Menahem
2049 Larchmont Way
Clearwater, FL 34624

Nathan Treadway
3769 South A st., #58
Ruchmond, IN 47374-6067
nathant@earlham.edu

Usona Junulara Informcentro

3600 Data Dr., #591
Rancho Cordova, CA 95670
usej@webcom.com
sybilh@calweb.com

Aventuroj en la Amislando . . .

The original flyer for JES featured a top ten list, so it's only natural that we close with one. From our home office in Lancaster, here's another list- lessons learned from somebody who tried to singlehandedly organize a weekend convention.

10. ESTU KIEL SKOLT(IN)O: ĈIAM PREPARITA

La plej gravaj problemoj temis pri "logistikaj" kaj programaj problemoj. Tamen, kion fakte oni povas fari en tia diversa grupo - ĉirkaŭ 21 personoj de variaj aĝoj? Cetere, iu LKK kaj pli da pripensado ja helpus!

9. NE FORGESU LA INFANOJN.

Ĉio okazis tre apud taŭgaj lokoj por infanoj. . . la biblioteka ĉambro estis apud la porinfana ĉambro, la parkoj havis ludejojn, kaj la hotela halo havis sufiĉe da kaŝlokoj por ludi "Kaŝu-kaj-Trovu". Pro tio JES meritis raran, kvarstelan premion de la tri-kaj-duono jaraĝa Amanda Wells (filino de Sherry kaj prezidontino de USEJ). Cetere, nun Amanda pli ofte uzas Esperanton ĉe domo kaj eĉ riproĉetas sian karan panjon kiam ŝi ne uzas Esperanton!

8. LA MANĜAĴOJ MALFERMIS LA KONGRESANOJN.

Stranga sed ne malkutima fenomeno. . . tio ja okazis kiam ni piknikis en urba parko. Inter sandviĉoj kaj terpomaj krespaĵoj abundis la diskutoj, ŝercoj kaj eĉ la kantoj kaj muziko, danke al Jed Metzler kaj Nijl Blonstein. . . Laŭdojn!

7. ĈU ESTUS KONSILINDE HAVI OFICIALAN FOTOGRAFISTON?

Kiel kutime, oni devas havi oficialan grupan kongresan foton. Pro tio, en la parko, Jim Medrano petis al iu piedmarŝanto tra la parko, ke li fotu nin. Bone - unu foto. Rapide venis aliaj fotoaparatoj. Dum li fotis la sep aŭ ok fotojn, liaj du infanoj forkuris.

6. HOTELOJ KUTIME ESTAS TRO FORMALAJ POR JUNULARAJ KONGRESOJ.

Kiam temas pri junularaj renkontiĝoj, pli malformalaj lokoj kiel tendumado estas pli taŭgaj lokoj. Mi antaŭnelonge trovis bonegan libron pri monaĥ(in)ejoj, kie eblas fari seminariojn, Sanctuaries de Jack kaj Marcia Kelly. Ĉu venontjare en kampara monaĥejo?

5. KONTROLU LA RESTORACION ZORGEME.

La elektita restoracio por la sabata vespermango verŝajne ne estis la plej afabla restoracio.

4. LA CO DE USEJ HAVAS LOKOJN NUR POR KELKAJ ESPERANTISTOJ.

Kiel promesite en la aliĝilo, la ĉeestantoj havis okazon viziti la mondfaman Centran Oficejon de USEJ (kiu estas ankaŭ hejmo por mi). Kvankam venis en mia salono pli da Esperantistoj ol mi planis. Ĉiukaze, neniuj plendis pri la du spektakloj "Mazi en Gondolando" kaj "The World of Esperanto",

3. ESPERANTISTOJ VERE ESTAS BONKORAJ.


La ĉeestantoj malavare kaj libervole donacis tiom, ke ne nur la Espero-Konto de UEA ricevis \$20 donacon, sed ankaŭ USEJ ricevis samkvantan donacon. Dankojn!

2. KELKFOJE LA PLEJ MEMORINDAJ PROGRAMOJ OKAZAS EKSTER LA PROGRAMO.

Preskaŭ meznokte sabaton Jed menciis, ke li bezonis intervui la junulojn por universitata raporto (jen sekvida ideo). Do, dum ĉiu viktimo (ha, ha, ha!) atendis sian vicon, la ceteraj junuloj babilis en la halo, pri la hispana lingvo en Argentino ĝis eksterlandaj dolĉaĵoj ĝis. . .

1. SE ONI MALSUKCESAS, KLOPODU, KLOPODU, KLOPODU DENOVE.

Malgraŭ ĉio, mi ankoraŭ deziras organizi veran junularan renkontiĝon denove. Ĉi-foje, danke al la supre menciitaj lecionoj, mi certas, ke ĝi estos pli sukcesa. Do, zorgeme trafoliumu la venontajn *KTP!* por informoj pri la 2a JES!



Bringing Hope in a Hopeless World

Kiel vi eble jam legis en la raporto pri JES, ĉeestantoj faris malgrandan sed ankoraŭ bonvenan danacon al la Espero -Konto de UEA. Ĉi tie estas eta priskribo de ĝia agado, por ke vi sciu kial oni elektis tiun Konton. Sube vi povos legi pri alia subtenenda agado de Esperantistoj.

Those who know a little about the early history of the Esperanto movement will realize that Esperantists have always searched for practical ways to use the language and the international network of Esperantists for bettering the world.

One of the present day methods of trying to bring hope to increasingly hopeless situations in today's world is through the Hope Account (Konto Espero) at the UEA. Established only in 1992, it already has surpassed \$20,000 in donations received from members and groups worldwide.

The money is used to help Esperantists throughout the globe who are in war torn countries, such as the lands of the former Yugoslavia and Burundi, through food packages and other items. (Unfortunately, UEA wasn't successful at reaching its contacts in Rwanda and improving the situation there.)

Renato Corsetti, the initiator of the Account, contrasts in a December 1994 article in Esperanto ethnic differences are separating peoples in the ex-Yugoslavia and causing pain and suffering while the multi-ethnic workers of the Hope Account are collaborating in

order to combat the situation. He also cites the popularity of the Account, which has seen donations from not only the "rich and famous" of the Esperantists movements, but also groups who are from economically unstable countries themselves and even university students, who are internationally renowned for being on tight budgets.

Unfortunately, it doesn't seem like the need for the Hope Account will diminish soon, so contributions, regardless of the amount, are still needed. Anyone who would like to aid the Hope Account in its work may send a donation through either USEJ or ELNA, mentioning "Por la Konto Espero".

Esperanto Venos Savi Vin!

You read a little about the Hope Account at the UEA and some of what it is doing to put Esperanto to practical work in humanitarian aid. Here's yet another example of how contacts made through Esperanto literally saved an Italian village. Other cases of worthwhile causes through Esperanto will appear in future issues of KTP!


Jen nekredebla rakonto. Post kiam pluvo kaj akvo inundis la urbojn kaj kampojn de norda Italio en novembro 1994, 10 volontuloj de la Itala Esperantista Junularo kaj la Esperanto-Centro de Torino rapide venis en la diversajn lokojn, aparte la urbon Alessandria, por helpi la loĝantojn.

Baldaŭ venis ankaŭ du Esperantistaj volontuloj de Nederlando, lando kiu ja havas spertojn rilate tiajn inundojn. La nederlandanoj kontaktis la urbestron de Maastricht, la sudnederlanda urbo kiun trafis inundoj nur antaŭ kelkaj monatoj. Danke al ĉi tiu Esperanta kontakto, la du urboj Alessandria kaj Maastricht povis dividi spertojn, konsilojn kaj teknikajn.

Instigate de ĉi tiu sperto, IEJ volas krei tutmondan internacian voluntulan reton kiu estos preta helpi en tiaj malfeliĉaj okazaĵoj. USEJ mem ankoraŭ ne havas pli da informoj, sed Francesco Amerio ĉe la malsupra adreso ja povos informi vi. Certe, kiam pli da informo atingos USEJn, ni trapasos ilin per la paĝoj de KTP!

Voluntula reto/Volunteer network:

Francesco Amerio
Itala Esperantista Junularo
via Pagliani 5
IT-10126 Torino
Italio
fakso +39 11 3190271



Jarraporto de USEJ 1994-1995

Tiu ĉi reporto validas por aŭgusto 1994 ĝis julio 1995. Ĝin verkis Joseph Truong, direktoro de USEJ. Bonvolu sendi viajn ideojn, demandojn, kritikojn ktp., al li rekte ĉe la redaktora adreso por ke la venontjara raporto estu pli utila kaj informplena.

ADMINISTRADO

La estraro ĝis aŭgusto 1994 estis Joseph Truong (PA, direktoro), Nathan Treadway (IN, kasisto), Randy Dean (GA, Komitatano A de TEJO), Mark Armanatrou (IN), Daniel Cuthbert (CT), Thomas Gray (TX) kaj Jacob Schwartz (NC).

La komunikado inter la estraranoj okazis nur helikopoŝte pro la bedaŭrinde fakto, ke la direktoro, kiu dissendas la leterojn, mem ne havis taŭgan komputilon. Tio ja malfaciligis kaj longigis la komunikadon. Pro tio, formala komitatkunsido estis planata dum la JES kunveno en marto, sed nur du estraranoj ĉeestis.

La estraro planis okazigi elektojn por nova estraro por 1995-1997. Ĉar nur ses kandidatoj sin prezentis por la ses lokoj en la estraro (N. Treadway daŭras sian laboron kiel kasisto), neniuj elektado okazis kaj la ses kandidatoj aŭtomate fariĝis Estraranoj.

La nova estraro, kiu servos de la 1a de aŭgusto 1995 ĝis la 1a de aŭgusto 1997, estas: Daniel Cuthbert (MD) Sybil Harlow (CA), Matt Horton (CA), Theresa Makin (PA), Jed Meltzer (PA), Guy Menahem (FL), kaj Nathan Treadway (IN). La nova estraro bonŝance havas du inajn anojn, bonan mikson da spertuloj kaj novuloj, kaj reprezentantojn de diversaj ŝtatoj de Usono.

Oficiala jarkunsido de USEJ okazos kadre la 43a Nacia Kongreso en New York City. Rezultoj kaj novaĵoj de ĉi tiu kunsido aperos en la venonta numero.

Daniel Cuthbert oficiale reprezentos USEJn kiel anstataŭanto de nia Komitano Randy Dean ĉe la 51a IJK en Sankta Peterburgo, Rusio (31.07- 07.08.95). Randy fariĝis en aprilo la Komitatano A de USEJ por alia periodo.

SERVOJ

1. Bulteno

KTP! ofte ricevas laŭdojn de multaj E-istoj, tamen la problemoj restas.

Plej rimarkinda problemoj por la membroj estas la malfrua alveno de *KTP!* De tiu periodo, aperis 4 numeroj (nov-dec, jan-feb, mar-apr, maj-aŭg) la lasta (ĉi tiu) duobla. Espereble, ekde aŭgusto, kiam la

redaktoro (mi) finfine aliĝos al e-poŝto, ni povas kompili la gazeton pli rapide kaj sekve dissendi ĝin pli frue.

Daŭras diskutoj kun la CO de ELNA pri kiel malgradigi la elspezojn kaj aŭ grandigi la enspezojn de *KTP!* Ekde ĉi-jare, la CO de ELNA ofertas abonon al *KTP!* por \$15; ne estas sciate, kiom da abonj ELNA havas por *KTP!*

La grafika kvalito de la gazeto daŭre pliboniĝas danke al la lerta komputilado de Sybil Harlow (CA), sed krom kelkaj fidindaj kontribuantoj (kiel Matt Horton, CA), malmulte da aliaj membroj verkas.

Cetere, pro manko da kontaktoj inter mi kaj la legantoj, estas tre, tre malfacile scii, ĉu la gazeto bone informas kaj interesas la membraron, ĉu la lingvaĵo estas tro dificila ktp.

2. Poŝta Biblioteko

Kvankam USEJ nun havas sufiĉe grandan gazetan bibliotekon, kun pli ol 110 titoloj kaj miloj da gazetoj de la tuta mondo, nur unu membro uzis ĝin ekde ĝia malfermiĝo en julio 1994. La Estraro pripensas solvon pri tiu krizeto dum la julia kunsido. USEJ tre dankas al ĉiuj malavaraĵoj E-istoj kiuj regule sendis siajn gazetojn al la Biblioteko dum la pasinta jaro!

3. Renkontiĝoj

Bonŝance, USEJ sukcesis rilate renkontiĝojn. Ĉi-jare, okazis tri junularaj renkontiĝoj organizitaj de USEJaj membroj:

- a. 1a Junulara Esperantista Semajnfino (Lancaster, PA; 17-19.03) Ĉeestis 21 personoj, plejparte anoj de la Novjorkurba Esperanto-Societo.
- b. 1a Florida Esperanta Kongreso (Belleair, FL; 07-09.04) Ĉeestis 16 personoj de ĉirkaŭ Florido. Organiza renkontiĝo por la Florida Esperanto-Ligo.
- c. Junulara programo kadre la 43a Nacia Kongreso (New York City, NY; 14-17.07): Ĝi estas la 3a fojo kiam USEJ organizis iun junularan programon ĉe la Nacia Kongreso

Malfeliĉe, pro diversaj kialoj (aparte manko da kunlaborantoj). la 2a Norda Amerika Junulara Tendumado, kiun Brian Krueger planis por Meksiko, Meksikio, en aŭgusto ne okazos. Tamen, li ankoraŭ entuziasmas labori por la 2a NAJT por 1996.

4. Elektronikaj servoj

Sybil Harlow kreis "ftp site" por USEJ kies adreso estas ftp.webcom.com/pub/usej kaj "www page" por USEJ ĉe <http://www.webcom.com/~usej>

5. Informado

Grava helpanto ĉi-rilate estas Catherine Schulze, kiu respondecas pri la senpaga poŝta kurso. Ŝi ofte sendis nomojn de junuloj kiuj studas per la kurso al la direktoro, kiu sekve kontaktis ĉiujn el ili.

Alvenis rekte al la CO de USEJ nur malmulte (malpli ol 10)

informpetoj pri Esperanto kaj/aŭ USEJ. Bedaurinde, tiuj skribantoj ne mencias de kie oni trovis la adreson aŭ nomon de USEJ.

Interesa informpeto venis el germana studento kiu baldaŭ venos al Georgia por studi teologion. Li volis kontakti Esperantistojn tie kaj trovis nian adreson per la Berlina oficejo de la Germana Esperanto-Junularo

EKSTERAJ RILATOJ

1. Ekstermovadoj

USEJ, kiel la usona landa sekcio de TEJO, sendos ĉu membrojn (Daniel Cuthbert kaj Joseph Truong) al la Junulara Forumo de la UNO (New York City, 17-19.07) kiel reprezentantojn de TEJO al UNO. Dum la pasintaj monatoj USEJ kunlaboris kun la KER (Komisiono pri Eksteraj Rilatoj) reprezentantoj de TEJO, Edlyn Teske kaj Anna Margareta Ritamaki, pri tio.

Kvankam okazis dum la sama somero kelkaj aliaj gravaj junularaj konferencoj (aparte la "Youth Konferenco en San Francisco), USEJ ne povis sendi iun reprezentanton.

2. Enmovadaj

USEJ daŭre tenas rilatojn kaj interŝanĝas novaĵleterojn de la junularoj asocioj de Francio, Kanado kaj Flandrio. Poste, aldoniĝis Kebekio, kiu renaskiĝis en septembro 1994 kaj Irano, unu el la novaj Landaj Sekcioj de TEJO. Denove, rilatoj temas nun nur pri interŝanĝoj de novaĵleteroj kaj spertoj.

USEJ atingis iom pli altan nivelon kun TEJO ĉar nun ambaŭ organizoj devas kunlabori por fari paŝojn por Esperanto ĉe UNO.

PROPAGANDO

Venis al la CO de USEJ ĝis nun novaĵoj de nur unu propagando de Esperanto far de junuloj. Guy Menahem (FL), fondintade la Florida Esperanto-Ligo, estis intervjuata de "Ten Teen News" (junulara programo de florida kanalo) post la fondiĝo de FEL. Ne okazis iu alia propagando de USEJ.

MEMBROJ/AKTIVULOJ

Je la 1a de julio, USEJ havis 100 membrojn. Dum la jaro venis kelkaj ideoj pri kiel ne nur allogi pli da junuloj, sed ankaŭ membrigi pli junajn Esperantistojn kiuj studas en lokaj klasoj.

La nombro da aktivuloj kaj volontuloj por USEJ ne superis 10 ĉi-jare. Tamen, ĉi-jare venis du tre viglaj kaj laboremaj regionaj aktivuloj kies laboro ja helpis al USEJ, Steve Blackstone (CT) kaj Guy Menahem (FL). Ili, malgraŭ la verdira manko da konkreta helpo de USEJ, daŭre laboris dum la jaro interesiĝi junulojn en siaj urboj kaj lernejoj pri Esperanto.

LOKA AGADO/LOKAJ GRUPOJ

La plej bonaj novaĵoj venis el Florido, kie USEJ-membro Guy Menahem fondis la Floridan Esperanton-Ligon, kiu laboregis dum pasintaj monatoj plifortigi la movadon en tiu ŝtato. Krom propagandi televide iom por Esperanto, FEL ankaŭ i.a. ekeldonis propran novaĵleteron (La Verda Stelo) kaj okazigis aprile kongreseton.

Steve Blackstone, la prezidanto de la Guilford Esperanto-Klubo, varbis inter la junuloj de sia urbo

diversmaniere. Fine de la lernjaro li raportis pri kelkaj sukcesoj.

Thomas Gray raportis, ke la movado en Houston, Teksaso, renaskiĝis post iom da instigado de Andrei Kolganov, uzbekia Esperantisto loĝanta en Usono. Tamen, ankoraŭ ne venis pli da novaĵoj pri tiu grupo.

Laŭ R. Kent Jones, kiu prizorgas lerneajn klasojn kie oni instruas E-on, estas almenaŭ 20 tiaj lernejoj kaj pli ol 700 Esperantaj lernantoj en Usono. Bedaurinde, ni ankoraŭ ne laboris multe kun ili.

FINAJ OPINIOJ

Kiel vi rimarkas de mia tro uzado de la radiko "daŭr-", USEJ verŝajne ne atingis tiom kompare al la lasta jaro, sed ĝi almenaŭ ekzistis. . . ĝi daŭris. Nuntempe, ja estas sufiĉe grava celo, ke nia organizo neniam denove mortu. Cetere, mi tre certas, ke la venonta estraro ne nur daŭrigos nian laboron, sed facile superos ĝin. ☆

Lalle Kaman!

Laŭ Atilio Orellana Rojas, argentina amiko de *KTP!*, ĉi tiel oni salutas en la kaljaŭaja lingvo parolata en Suda Ameriko. En ĉiu numero, ni havas lokon kie vi povas lerni per Esperanto kelkajn frazojn en aliaj lingvoj. Ankaŭ vi povas uzi la lingvan angulon prezenti vian gepatran lingvon, aŭ iun alian lingvon kiun vi bone regas. Vi nur bezonas sendi al ni la tradukojn kaj prononcon (uzante la Esperantan ortografion) de la unuaj naŭ ĉiutagaj esprimoj sube kaj tri aliaj frazoj laŭ via elekto. La tri frazoj povas esti langorompiloj, aliaj kutimaj esprimoj, junulaj esprimoj (premio por plej sprita frazo ĝis nun: "Ar det nagot bra pa TV i kvall?" - "Ĉu estas io interesa en la televidilo ĉi-vespere?" en la sveda sendita de Fredrik Olofsson). . . Aparte bezonata nun estas kontribuo en la ĉeĥa por la venontjara UK. Sendu ĝin al la redaktoro, kies adreso aperas sur la dua paĝo. Kaj, cam on! (Dankon!" en la vjetnama).

Lingva angulo

Danke al la pligrandiĝanta ekonomia kaj politika potenco de Japanio, la japana fariĝas pli kaj pli studata lingvo inter usonaj junuloj. Joel Brozovsky, kiu laboras por Oomoto en Kameoka, Japanio, jam de kelkaj jaroj loĝas en la Lando de la Leviĝanta Suno kaj sendis sian kontribuon. Mi mem kontribuas per du sufiĉe ofte aŭdataj demandoj de eksterlandoj: "Wakarimasu ka?" (ŭakarimas ka) (Ĉu vi komprenas?). Ridetu feliĉe kaj respondu, "Hai, wakarimasu!" (haj, ŭakarimas!) (Jes, mi komprenas!) ☆

◆ Saluton!

Konnitiwa! (*konnĉiŭa*)

◆ Bonan tagon!

Konnitiwa! (*konnĉiŭa*)

◆ Kiel vi fartas?

Genki desu ka? (*genki des ka*)

◆ Mi fartas bone.

Genki desu. (*genki des*)

◆ Mi fartas malbone.

Genki dewa arismasen.
(*genki deŭa arismasen*)

◆ Mi fartas sufiĉe bone.

Ma-ma. (*ma ma*)

◆ Mia nomo estas . . .

. . . desu. (*. . . des*)

◆ Ĉu vi parolas E-on?

Esperanto-go wa hanimasu ka?
(*esperanto-go ŭa hanimas ka*)

◆ Bonan Apetiton

Itadakimasu (*itadakimas*)

◆ Dankon!

Arigato gozaimasu (*arigato gozajmas*)

◆ Dankon pro manĝo. (post la manĝado)

Gotisō sama desita. (*gotiso sama deŝita*)

◆ Pardonon (kiam oni forlasas tablon)

Osaki ni. (*osaki ni*)

@esperanto



Ĉu vi uzas komputoron kaj neniam sciis kiel fari la Esperantan supersignitajn literojn en via favora programo? Espereble, ni povas helpi vin hodiaŭ.

♦ **What are some of the techniques you can use to get supersigned letters?**

There are a few popular solutions. One is to use a word processing feature called the overstrike character. This is usually found under Text (style) as a special effect. To use it, and just highlight the letter and then make the overstrike character, the "^". Sounds like to much of a pain to do on a regular basis? Well, think about creating a macro (probably under the tools section along with the spell checker). The main problem with this is that, at least on my program, is that, well, this happens C, or U so it wasn't really an option for me. So what did I use? The other solution, is to use fonts that have an Esperanto character set.

♦ **Where do I get those??**

There are quite a few places actually. There are some available on the Internet, mainly at ftp.stack.urb.tue.nl. You can also just flat out buy them from various sources such as

MONO, Skrytka 147, PL 47-220, Kedzierzyn : True Type Fonts (about 55 different fonts)

ILO software, P.O. Box 664, Oneida, NY 13421: Raster Fonts, Truetype Fonts, and EGA Screen Fonts

ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Mac fonts and IBM fonts

♦ **So I've got some fonts, now what do I do?**

You need to find out the ASCII code of the supersigned characters. You can do this in Windows by running the Windows Character Map, choosing the font(s) you want to use and looking at their character sets. Click once on the character(s) and then their ASCII codes show up in the status bar at the bottom right of the window. You can choose to copy the characters to the clipboard there, but that usually turns out to be annoying. Once you know what all the characters are, you should be able to access them in any Windows or Dos program by entering the ASCII code for the letter. (Hold down the Alt key and type in the ASCII code of the character on the numeric keypad (the one on the side, NUMLOCK must be on.))

♦ **That sounds awfully tiresome to do when I am typing. What else can I do?**

One way to avoid this is to type in the document in ASCII format (the x following the letter to be supersigned) and then use Find/Replace with the actual Esperanto character.

Another is to program macros for each of the supersigned characters. The only problem is that sometimes the control keys that you want are being used already for the program, and so you end up with some strange, hard to remember keys (example ŝ is ctrl-a for me and I hit ctrl-s all the time which saves my document instead).

♦ **Is there any way to avoid all that hassle?**

Recently some new programs have come on the market, namely, Esperanto word processors. Vortilo 3.0 (deluxe) and Ĉapelilo.

These programs come with the fonts and appropriate macros incorporated into the programs. While they are in general more simplistic than the average English word processor, they do seem to contain all the necessary bells and whistles to make most users happy. The programs are also friendly to exporting the text to other formats. Ĉapelilo has a special internet-friendly x-format to save you labor, and Vortilo allows for import/export with the Rich Text Format. Both have built in dictionaries, Ĉapelilo is based off the PIV, while Vortilo uses its own Vortaro 3.2 which is an Esperanto-English dictionary and thesaurus, featuring topics, cross-referencing, and English keywords. So writing in Esperanto can become easier for everyone.

Vortilo 3.0e Deluxe

ILO software
P.O. Box 664
Oneida, NY 13421, USONO
ArkeyMT@aol.com

Ĉapelilo

Professional Consulting,
s-ro PEJNO Simono,
Adolf-Moeller-Str. 4,
D-61250 Usingen, GERMANUJO
100103.24@compuserve.com

♦ **So, what do you use?**

For the KTP! newsletter, I use Ami Pro 3.1, MONO true type fonts and Typetwister (for headlines) from Aldus. For personal letters, I am planning on buying the Vortilo 3.0 deluxe. ☆

*Sybil Harlow
Sacramento, CA*



CERBUMADU!

Konsiloj pri kiel trovi ideojn

One of my goals for next year was to organize a leadership session. Since I won't be able to get to that project anytime soon, I'll pass on one of the courses which I hoped to present. . .

Mi ne ŝajngigas, ke mi prezentas ĉian manieron oni povus esti kreiva aŭ ideoplena! Tamen, post legado de ĉi tiu artikolo, vi eble pli bone povas funkciigi vian cerbon kaj uzi ĝin ĝuste.

Tre leginda libro pri tiu temo estas "What a Great Idea!" de Charles "Chic" Thompson. Bedaŭrinde, mi ne havas pli da informoj pri ĝi, sed loka biblioteko (aŭ interbiblioteka sistemo) certe povas trovi ĝin por vi.

TRI GRAVAJ PUNKTOJ!!!!

* Ĉu la cerbo estas komforta?

Ĉu vi ne tute malŝatas, kiam ni subite memoras informojn kaj faktojn kiujn ni treege bezonis pli frue sed ne povis memori?! Ankaŭ ideoj venas ĉi tiel, kiam la cerbo estas komforta kaj ne sub iu premo. Tial ofte la plej kreivaj idoj alvenas kiam ni estas en la banĉambro! Do, sci, ke viaj verŝajne plej bonaj ideoj venos kiam vi tute ne atendas ilin. Tial la sekva punkto. . .

* Ideoj estas kunikloj. . .

Ĉar ili rapide foriras se vi ne kaptas ilin! Kiam vi havaas bonegan ideon, estas aparte grave, ke vi iel kaptu ĝin. Kiam ajn mi havas, vidas aŭ aŭdas ideon, mi priskribas ĝin tre mallonge sur kartojn, kaj poste metas ilin en idean bankon".

Tamen, kial ne uzi la telefonrespondilon se vi survoje al laboro trovas bonan ideon? Metu kraĵonon kaj paperon apud via lito (kaj ankaŭ en via banĉambro). Metu la informojn en komputilon. Eĉ eldonu ilin. . . ĉinumere Christophe Fere eldonas "ideojn de la monato" en JeunEsperanto (la novaĵletero de la franca junularo). . . laŭdinde!

* Lernu ĉiom laŭeble pri ĉio.

Ju pli vi scias, des pli multe vi povas fari. Kiam vi scias sufiĉe por vidi la problemon de multaj aliaj perspektivoj anstataŭ de nur unu aŭ du, la solvoj pli facile troveblas.

NUN, CERBUMU!

* Kio okazus se. . .

Kio okazus se vi malgrandigus ion, kiel libron? Vi tiel povus meti ĝin en vian poŝon. Tial dum multaj jaroj, "ŝlosiloj de Esperanto" estis tre popularaj, ĉar oni facile povis disdoni ilin, sendi ilin, ktp.

Simple metu iun adjektivon en tiun frazon kaj vi havos aliajn ideojn. Kio okazus se vi igus ion bela, rapida, granda?

* Kiel oni povus. . .

Vi povas duobligi viajn ideojn per la renverso de la supra ekzerco. . . Kiel oni povus igi Esperanton pli granda? Ĉu iu kuraĝas meti informojn pri Esperanto sur tiujn grandajn afiŝojn kiujn oni vidas laŭ la aŭtovojo? Kiel oni povus igi Esperanton pli bela? Kial ne uzi manekenojn?! (Jam du ideoj!)

* Nel

Pensu pri la "malo". Se ni volas, ke neni parolu Esperanton, ni:

- a. ne reklamu la lingvon; fakte, ni kaŝu ĝin kiel eble plej multe
- b. agu kiel frenezuloj aŭ fanatikuloj
- c. certe, neniam instruu ĝin al junuloj!

* Prunteprenu ideojn de aliaj homoj aŭ lokoj.

Ĝis certa limo vi povas uzi ideojn proponatajn ie alie. Komprenu ke ekzistas tre mallarĝa linio inter "bona uzado de alia ideo" kaj

"ŝtelado de ideo". Sed, vi estas Esperantisto, do ja sufiĉe inteligenta scii la diferencon.

Certe, konu la laboran kaj agadon de aliaj organizoj. Ĉu vi scias, kiajn allogajn teknikojn uzas la Goethe Institut (organizo kreita divastigi la germanan) aŭ Alliance Française (la francan)?

* Kial? Kial? Kial? Kial?

Kial USEJ ne estas pli granda? Ĉar ne estas sufiĉe da helpantoj. Kial ne estas sufiĉe da helpantoj? Ĉar vi ne laboras por USEJ. Kial vi ne laboras por UEJ? Ĉar vi ankorau ne finis ĉi tiun artikolon. . .

Kiam vi ne komprenis iun problemon, demandu tri- aŭ kvarfoje "Kial?". Ĉi tiel vi havos kelkajn novajn aspektojn de tiu problemo, kaj pli facile povas trovi solvojn.

* Liberigu vin de tro da supozoj.

Komprenoble oni nur povas fizike ĉeesti kongreson. Ĉu vere? Danke al nia amiko, teknologio, vi nun povas okazigi kunsidon per telefono, televido, video ktp. (Ĉu la venontaj IJK okazos per telefonoj? . . . nu, espereble ne. . .)

Ne supozu ĉion; ne pensu ĉiam, ke "oni implicas ion" en iu projekto aŭ problemo. Ekzemple, ne supozu, ke Esperantistoj ne volas kuir ĉe aranĝoj. Fakte, la Esperanto-Junularo de Leipzig dediĉis tutan semajnon al la kukbakado!

* Rompu supozojn al via avantaĝo.

Kiam restas supozoj, vi povas trovi kelkajn kreivajn manierojn rompi tiujn antaŭjuĝojn. "Esperanto zorgas nur pri intelektaj aferoj". Jen iom da instigado doni

al junuloj okazojn montri siajn interesojn ankaŭ pri sporto, vestaĵoj, kaj aliaj flankoj de la junulara vivo ne ofta traktata.

*** Laboru renverse.**

Foje estus pli konsilinde pensi pri la finaj rezultoj. . . kion vi volas, ke okazu. Poste vi povas ellabori la pasojn al via celo. Cetere, estu akurata kaj ekzakta en via demando. Ĉu vi volas, ke ĉiuj parolu Esperanton, aŭ ĉiuj uzu Esperanton? Jen du malsamaj demandoj, kun du malsamaj strategioj.

Do, jen la hodiaŭa leciono. Mi ĉiam bonvenigas de vi novajn manierojn esti kreiva kaj, kompreneble, novajn ideojn. Do, pretigu koverton kun la **KTP!**-a adreso sur ĝi. . . kaj ekcerbumu! Mi atendas viajn kontribuojn! ☆

Usona Esperanista Junularo

Central Office

3600 Data Dr., #591

Rancho Cordova, CA 95670

(916) 853-3465

usej@webcom.com

USEJ is the non-profit, national organization for Esperantists 27 years old and under.

Membership: \$15/year

Subscription to KTP!: \$15/year

Donations, subscriptions, etc., can be made payable to "Usona Esperantista Junularo" and sent to:

Nathan Treadway

Treasurer, USEJ

3769 South A Street

Richmond, IN 47374

Guste kiel James Bond

Here's a short quiz to see just how cool, suave and collected you really are under those tough situations. Tell us how you did- and feel free to add your experiences. . .

Ni ĉiuj admiras la personojn kiuj ĉiam scias kiel agi ĝentile, agrable kaj tute paceme dum tiuj strangaj eventoj. Ili povas rideti sen embarasiĝi, unumane ĉesi akcidentojn antaŭ ol ili eĉ okazas, kaj respondi sprite kaj amuze al la plej malfacilaj kaj enigmaj demandoj.

Ĉu vi estas unu el tiuj raraĵoj? Faru la jenan kvizon por ekscii:

Situacio 1:

Vi sidas en aviadilo. Je la dekstre estas viro kiu certe ne sin duŝis dum kelkaj tagoj, aŭ eĉ semajnoj. Je la alia flanko estas panjo kun bebo. Kion vi farus?

a. Fermu vian nazon kaj klopodegu dormi dum la tuta naŭ-hora vojaĝo.

b. Petu al la stevardo, "Pardonon, sed mi estas. . . um. . . vegeterano. . . jes, vegeteranoj! . . . do, ĉu vi povus meti min en sektion por vegeteranoj?"

c. Persvadu la panjon. "Estas scienca fakto, ke la infanoj dormas pli dolĉe dum la panjo sidas en la centra seĝo de vico da seĝoj, kiel nia vico."

Kion vere okazis: La homo kuŝis pli apud la panjo kiam subite la bebo vomis sur lin. Forirante la banĉambro post purigadi la ĉemizon, virino ŝvenis en lian brakojn. Alia pasenĝero, pensante ke ili faras iun nedecan agon publike, tuj sciigis stevardinon, kiu sufiĉe laŭte riproĉegis la povrulon antaŭ ĉiuj. (Laŭ artikolo en Travel Holiday)

Situacio 2:

Vi ĉeestas neformalan kompanian feston kun via juna filino. Baldaŭ venas via ĉefestro, kiu demandas al la etulino, "Kiun laboron vi volos fari?" Via filino demandas al vi, "Ĉu ankaŭ mi faru vian laboron?" Kion vi faru?

a. Tre rapide ŝanĝu la temon. "Kian bonegan veteron ni havas en (plenigu vian urbon ĉi tie) hodiaŭ!"

b. Agu kvazaŭ vi tute ne aŭdis la demandon.

c. Rimarku, "Ho, infoanoj nuntempe havas la plej naivajn demandojn!", ridetu, kaj ŝanĝu la temon.

Kion vere okazis: La virino volis diri al ŝia filino ke ŝi faru tion kion ŝi vere volas fari. Do, la panjo respondis al al demando, "Tute ne, mielo. Mi volas, ke vi estu feliĉa." (Reader's Digest)

Situacio 3:

Vespere vi ĵus alvenis ĉe la apartamento de via Esperanta gastiganto en Hungario. Vi petas, ke vi povu sin duŝi en la banĉambro. Vi eniras la banĉambrom, malfermas la pordon, kaj poste havas tre agrablan duŝon.

Ĉio fartas bone ĝis kiam vi bezonas eliri la ĉambron. . . la pordo ne malfermiĝas. Vi ŝlosilis ĝin akcidente. Kion vi farus?

a. Atendu en la banĉambro. Via gastiganto devus uzi ĝin antaŭ ol dormi, ĉu ne?

b. Uzante etan trancilon kiun vi ĉiam kunportas en viaj kalsonoj, vi facile kaj senpene malŝlosilas la pordon.

c. Vi tuj pentas por viaj pekoj. Vi komprenas, ke ne restas espero por vi kaj vi plej verŝajne pasigos la ceteran se via vivo (eble 1, aŭ 2 tagoj?) en tiu eta ĉambro.

Kion vere okazis: Vi afable sed iom timeme petas tra la pordo la helpon de la gastiganto. Ĉar ŝi ne povis fari multe, ŝi alvokas la helpon de najbaroj. Ses viroj bezonas elpreni la tutan pordon antaŭ al vi povas eliri. (Bedaŭrinde, ĉi tiu sperto venas el la tragika vivo de la redaktoro mem.)

ISSN # 1078-6554


Lancaster, PA 17603-5114

624 Second St.

KTPi

*Ni esperas ke vi havus bonan kaj
belan someron. Ni vidas vinen
en Septembro.*

Ĝis!



What's Inside:

- * Meet the new board of USEJ*
- * BENNEM x 2*
- * Top ten list from the 1a JES conference*
- * Esperantists making the world a better place*
- * Rock and Esperanto*
- * A guide to Word Processing in Esperanto*
- * and much more...*